

Usona Esperantisto № 2019:4 (jul-aug)

Announcements

Paralela Universo Aug 17th; English/Esperanto translators wanted; nova Estraro por UEA; jam multaj aliĝoj por UK en Montrealo; UEA serĉas korusojn

Niaj internaciaj rilatoj

de la prezidanto • Filipo DORCAS

Pri kiaj internaciaj temoj vi aŭ via klubo eksciu?

De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Esperanto en la banĉambro

leterkesto • Mark HAMME

Multaj homoj mencias al mi la tri artikolojn pri Esperanto en la libro *Uncle John's Heavy Duty Bathroom Reader*.

Kejti NEILSON

laŭdoj • Charlotte BURTON

Kejti eklernis Esperanton antaŭ nur tri jaroj, sed ŝia nomo nun estas konata de aktivaj junuloj ĉirkaŭ la mondo.

Leonardo kaj kreemo

kongresaj raportoj • David K. JORDAN

Mi ne certas kial mi konsentis priprelegi "kreemon", temon tro abstraktan por facila kaj konciza traktado. Mi petis ideojn je kolegoj. Unu malhelpeme respondis, "Do, estu kreema!"

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

La kvara en serio de bildstrioj danke al Timoteo BORONCZYK.

Instrui kaj praktiki Esperanton per surtablaj rolludoj

ludoj • Timoteo RICE

Homoj nature estas rakontistoj. Ekde la komenco de racio, la homaro verkis historiojn pri ĉio.

La murdita skiisto

enigmoj • Daĉjo RUTAN

"Kiam la mez-janua varmiĝo fandis la neĝdunojn", rakontis Senom, "en ski-feriejo la polico trovis sportaŭton apud izolita ĉaledo. En la ĉaledo ili trovis du kadavrojn."

Solvo de la enigmo en n-ro 2019:3

enigmo-solvoj

Solvo de la pasintnumera krucvortenigmo.



Charlotte Gabriela TELEKI kaj Charlotte BURTON (dekstre) en Liptovský Hrádok.

Anoncoj

Paralela Universo coming August 17th

According to the **website of *Paralela Universo***



<<https://paralelauniverso.com>>, *Paralela Universo* is a one day Esperanto celebration occurring in many locations simultaneously. The event includes lunch, group activities, dinner, and lasts from about noon until 8 pm.

The website states that both Esperanto speakers and people interested in Esperanto are welcome. North American cities with a *Paralela Universo* event include: **San Francisco** <<http://esperantofre.com/edu/paralelaa.htm>>, **Montreal**

<<https://paralelauniverso.com/>>, **Aurora, Colorado** <<https://www.meetup.com/Denver-Esperanto-Meetup/events/263813595/>>, **Monterrey, Mexico** <<https://www.facebook.com/events/696544724125408/>>, **Austin, Texas**

<<https://www.facebook.com/events/2499727893391770/>>, **Seattle, Washington**

<<https://www.facebook.com/events/352549062350255/>>; and many others. Visit **the website of *Paralela Universo***

<<https://paralelauniverso.com>> to learn more and find the location closest to you.

— *Chloe EVERHART*

Translators needed

Hieroglifs Translations

<<http://www.hieroglifstranslations.ro>>, part of the Hieroglifs International company, is currently recruiting freelance collaborators for an ongoing translation project of Esperanto-English and English-Esperanto.

If you are available, please contact



gabriela.tudor@hieroglifstranslations.ro and she will get back to you with all the relevant info.

Nova Estraro por UEA



En sia unua kunsido dum la 104-a Universala Kongreso, la Komitato de UEA elektis novan Estraron por la venonta trijara periodo.

Estis entute naŭ kandidatoj por la Estraro, inkluzive de du kandidatoj por Prezidanto: Duncan CHARTERS kaj Fernando MAIA. Ambaŭ kandidatoj konfirmis sian pretecon kunlabori en Estraro gvidata de la alia, kaj ambaŭ emfazis la bezonon de harmonia, teama etoso. En la unua rondo neniu el la du kandidatoj ricevis la laŭregulare postulatan plimulton. En la dua baloto estis elektita Charters per unu voĉo pli ol Maia.

En la fino, la nova Estraro ricevis jenan konsiston: Duncan CHARTERS (prezidanto); Fernando MAIA kaj Trezoro HUANG Yinbao (vicprezidantoj); Aleks KADAR (ĝenerala sekretario); kaj Orlando RAOLA, Jérémie SABIYUMVA, SO Jinsu, kaj Amri WANDEL.

La taskodivido kundecidita de la Estraro dum sia merkreda kunsido estas la jena:

- **Prezidanto:** Duncan CHARTERS – Kunordigo, Strategio, Instruado, Rilatoj kun ILEI

- **Vicprezidanto:** Fernando Jorge PEDROSA MAIA Jr. – Centra Oficejo, Statuta Reformo, Eksteraj Rilatoj (krom Unesko), Ameriko, Rilatoj kun TEJO, Rilatoj kun Membro-Organizoj
- **Vicprezidanto:** HUANG Yinbao (Trezo) – Financoj, Unesko.
- **Ĝenerala Sekretario:** Aleks KADAR – Administrado, Ĝemelaj Urboj, Esperanto-Centroj, Eŭropo, Revuo *Esperanto*.
- Orlando E. RAOLA – Kulturo, Kongresoj, Biblioteko, Eldonado, Esploro kaj Dokumentado, Terminologio.
- Jérémie SABIYUMVA – Afriko, Aktivula Maturigo.
- So Jinsu – Azio, Oceanio, Informado kaj Amikoj de Esperanto.
- Amri WANDEL – Scienca kaj Faka Agado, Meza Oriento kaj Norda Afriko.

La nova Estraro ekoficis lundon, la 22-an de Julio, kadre de la tria Komitata kunsido en Lahtio.

Jam multaj aliĝoj por UK en Montrealo



Dum la flagtransdona ceremonio de la LKK en Lahtio (foto: Anna STRIGANOVA).

La montreala UK sukcesis kapti atenton de kongresanoj en Lahtio: ĉ. 90 homoj – 10% de kongresanoj – jam aliĝis por la venontjara kongreso

en Kanado. La averaĝa kvanto en la antaŭa UK estis ĉ. 60, do por Montrealo aliĝis jam 50% pli ol averaĝe.

“Ni estas tre feliĉaj pri la grandega intereso kaj tiom multaj aliĝoj”, diras Ĵenja AMIS, la respondeculo pri informado. “La intereso pri Montrealo kaj Kanado estis enorma – pluraj centoj da kongresanoj venis al nia tablo kun granda scivolemo kaj multaj demandoj kaj la plejparto de la venintoj intencis partopreni.”

“La urbo ‘vendas’ sin mem”, diras Joel AMIS, vicprezidanto de LKK: “Ĝi estas riĉa je historio – 377-jara – unu el la plej malnovaj urboj en Nord-Ameriko. En Montrealo abundas vidindaĵoj, mondfamaj muzeoj kaj nokta vivo. Ĝi proponas riĉan kulturon kaj bonegan gastronomion. La urbo havas ĉ. 1.3 milionon da loĝantoj kaj estas sufiĉe granda por havi riĉegan kulturen vivon, sed sufiĉe malgranda, por sentiĝi hejme kaj senhastaj”.

Nicolas VIAU, vicprezidanto de la LKK, diras, ke oni ofte demandis pri la lingvoj en Montrealo: “La ĉefa lingvo en Montrealo, kiel ĝenerale en Kebekio, estas la franca, sed en Montrealo oni ofte kapablas funkcii dulingve, kio estas alia interesa afero pri Montrealo, aparte por esperantistoj. Tamen, paŝante surstrate oni ofte aŭdas plurajn aliajn lingvojn, ĉar Montrealon riĉigis – lingve, kulture, gastronomie – multaj enmigrintoj.”

La teamo ankaŭ preparas multajn belajn ekskursojn dum-, antaŭ- kaj postkongresajn kaj riĉegan kulturen programon: “Montrealo estas universo en si mem kaj dum la nacia vespero vi konatiĝos kun muziko kaj dancoj de diversaj popoloj, kiuj ‘kreis’ Montrealon, kaj ankaŭ, kompreneble, kun la indiĝena arto”, diras Ĵenja Amis. “Vi ankaŭ feliĉos revidi konatajn Esperanto-artistojn kaj konatiĝi kun novaj steluloj de Esperantujo.”

La 105-a Universala Kongreso en Montrealo okazos de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto 2020 en la hotelo Sheraton, kiu situas urbocentre, ĉe du ĉefaj metrolinioj. “La situo de nia kongresejo estas vere perfekta”, diras Normand FLEURY, la prezidanto de la LKK. “La urbo proponas diversajn loĝ-eblojn en la proksimeco. La kongresa hotelo estos havebla favore pro favora kurzo de la kanada dolaro kompare al eŭro, la montrealaj prezoj tre bone kompariĝas al la eŭropaj aŭ usonaj prezoj.”

La temo de la kongreso estos: “UN 75-jaraĝa: dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo” – tre bona temo por krei novajn strategiajn aliancojn kun politikistoj, funkciuloj kaj NRO-oj. Antaŭ UK okazos la 53-a ILEI-kongreso, de la 25-a de Julio ĝis la 1-a de Aŭgusto, en Kebekurbo, kun komuna busveturado al Montrealo. Tuj post UK okazos Nitobe-simpozio (de la 1-a ĝis la 3-a de Aŭgusto). Samtempe kun la UK en Montrealo okazos indiĝena festivalo, tiel ke la kongresanoj povos aparte bone konatiĝi kun indiĝenaj kulturoj de Kanado.

Por pli da informoj, vidu: **Esperanto2020.ca**

<<https://Esperanto2020.ca>>, **Facebook**

<<http://facebook.com/Montrealo.kongreso>>, **videa**

invito al la UK <<https://youtu.be/qeKc1WVTUe0>>,>

Prezentajo (PDF-dosiero)

<[https://esperanto2020.ca/wp-content/uploads/2019/08/Bonvenon_al_Montrealo_prezenta](https://esperanto2020.ca/wp-content/uploads/2019/08/Bonvenon_al_Montrealo_prezenta%C4%B5o_fina.pdf)

[/2019/08/Bonvenon_al_Montrealo_prezenta](https://esperanto2020.ca/wp-content/uploads/2019/08/Bonvenon_al_Montrealo_prezenta%C4%B5o_fina.pdf)

[%C4%B5o_fina.pdf](https://esperanto2020.ca/wp-content/uploads/2019/08/Bonvenon_al_Montrealo_prezenta%C4%B5o_fina.pdf)>, **Gazetaraj reeĥoj**

<<https://esperanto2020.ca/eo/pri-ni-gazetaro/>>

Korespondi deziras

Mia nomo estas Luis Rafael.

Mi partoprenas en malgranda grupo de lernantoj en mia vilaĝo Cascajal (Kaskajalo).

Interesas min havi korespondadon kun samideano de via lando.

Luis Rafael Berrios Macario, Vaquerito Norte #12-A Cascajal-54490, Villa Clara, CUBA.
luisrafael.berrios@nauta.cu



Unesko uzos Esperanton en

festivalo



En Septembro 2020 Unesko okazigos festivalon por la paco en Tolosa (Hispanujo). La kvar laborlingvoj estas la franca, la angla, la hispana kaj ... Esperanto! La festivalo konsistas grandparte el filmetoj de kiel eble plej multe da korusoj tra la mondo kantantaj en plej diversaj lingvoj, sed la tekstoj de la kantoj devos esti tradukitaj al unu el la kvar laborlingvoj.

Laŭ UEA la festivalo estas grava ŝanco kontribui en la realigo de la celoj de UN, kaj por vidigi al la publiko la valoron de la internacia lingvo Esperanto. Ju pli multe da korusoj estos rekomenditaj de esperantistoj, des pli multe videblos al la publiko utileco de Esperanto kaj vasteco de la naciecoj de la esperantistoj. UEA petas rekomendojn de landaj asocioj, lokaj grupoj kaj aktivuloj.

Se vi konas koruson, kiu povus realigi tian tri-minutan filmeton de kanto por la paco, en iu ajn lingvo (kun traduko de la teksto al Esperanto) aŭ rekte en Esperanto, kontaktu al François LO JACOMO francois@lojacomo.eu, reprezentanto de UEA ĉe Unesko, kaj Trezoro HUANG Yinbao trezoro@qq.com, vicprezidanto de UEA, respondeca pri la rilatoj kun Unesko.

Niaj internaciaj rilatoj

de la prezidanto • Filippo DORCAS

Pri kiaj internaciaj temoj vi aŭ vi klubo eksciuj?

Pri UEA

Via Esperanto-USA estas organiza membro de la Universala Esperanto-Asocio (UEA). Multaj landaj organizoj de Esperanto estas tiaj membroj de UEA. Ankaŭ multaj membroj de Esperanto-USA estas individuaj membroj de UEA.

Por trovi pliajn informojn pri UEA, iru al **la retejo de UEA** <<http://uea.org>>. Se vi jam estas membro, legu la pasintajn numerojn de *Esperanto*, la oficiala inform-organo de UEA.

Pri Duncan CHARTERS

Nia kara membro Duncan, kiu servis multflanke al la movado en Usono dum multaj jaroj, estas la nova prezidanto de UEA! Antaŭ ol NASK ekaperis, Duncan Charters gvidis kursojn, kiuj metis la antaŭfondaĵon por NASK, kiu ĵus festis la 50-jaran jubileon.

Mia propra unua sperto kun D-ro Charters okazis dum la 47-a Landa Kongreso de ELNA en 1999, en kiu li elparolis la anoncojn tiel klare, ke mi povis vidi ĉiun literon de la lingvo, kiun li elbuŝigis. Tian klaran prononc-kapablon li lernis sub la gvido de la fama Esperanta majstro Ivo LAPENNA.

Nia plej klara ŝanco partopreni en la internacia movado nun estas jam plani partopreni en la Universala Kongreso de 2020 en Montrealo, Kanado. Tio estas granda ŝanco por ni partopreni, kaj eĉ helpi kaj lanĉi tiun grandan eventon, kiu malofte okazas en Nordameriko. Por pliaj informoj pri tiu UK, vizitu la **retejon de UK-2020** <<https://esperanto2020.ca>>. Esperanto-USA estas kun-gastiganto por la UK. Bonvolu helpi nin se vi volas.

Pri la junuloj

La Usona Esperantista Junularo (USEJ) nun tre aktivas, kaj planas eventon post kelkaj monatoj en Ĉikago por trejni la novajn junajn gvidantojn de Usono. Ĉefa celo de tiu trejnado estas plani eventojn por la junuloj por la UK en Montrealo. Via bonkora donaco al nia kampanjo Esperanto in the USA helpos la junulojn.

Via Internacia partoprenado

Vi kaj viaj klubanoj povos ekscii pri la internacia movado kaj pri kio okazas en aliaj landoj diversmaniere.

1. Membriĝu en UEA. Tion vi faru kiam vi membriĝas al Esperanto-USA per nia retbutiko.
2. Legu pri la internacia movado per Interreto aŭ per *Esperanto*, la informilo de UEA. Rimarku, kio okazas multflanke en diversaj landoj kaj kulturoj.
3. Faru internacian programeron en via klubo. Se vi ne havas aktivan lokan grupon, serĉu en nia adresaro de lokaj grupoj. Kaj kontaktu vian regionan helpanton.
4. Korespondu kun plumamiko en alia lando. Pri tio vi serĉu per sociaj komunikiloj aŭ per babilado en via loka aŭ regiona grupo.

Ek kaj antaŭen internacie!



Filippo DORCAS

Filippo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabetho loĝas en Fort Worth, Teksaso.

filipo@grupoj.org

De la estraro

En ĉiu numero de *UE* ni petas al la estraranoj raporti lastatempajn farojn. Ĉu vi havas demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro? Sendu ilin al ni en aŭ Esperanto aŭ la angla, laŭ via prefero. La redakciaj adresoj troviĝas en la kolofono.

Revene de IJK!

Antaŭ kelkaj semajnoj, mi partoprenis en mia unua IJK. Mi povis partopreni pro grandega helpo de la konkurso *Partoprenu IJK-n*. Per tio, TEJO pagis miajn kongresajn kostojn kaj eĉ helpis pri la flugokostoj, kaj sen tiom granda helpo, mi ne povus partopreni ĝin.



Kiel parto de tio, mi konsentis gvidi kelkajn paroligajn rondojn por progresantoj. Krome, mi fariĝis la anstataŭanto por la Usona Komitato A ĉe la TEJO-komitatkunsido. Krome, kiel parto de stipendio, kiun mi ricevis de la Fonduso de EUSA por Edukadaĵ Filmoj, mi ankaŭ antaŭe konsentis registri iom da filmetoj dum la kongreso, por montri al junuloj en Usono, kia estas IJK.

Do, eĉ monatoj antaŭ la kongreso mem, mi jam havis multe da laboro, kiun mi devis fari tie. Feliĉe, mi jam havis karajn esperantistojn, kiuj helpas min pri la vojaĝo kaj aliaj aferoj.

Mi komencos mian rakonton ĉe la kongresejo mem, ĉar mi ne partoprenis la karavanon de esperantistoj, kiuj iris kune al IJK.

Mi alvenis al la kongresejo post tre longa vojaĝo kaj jam suferis iom da horzonozo. Tuj kiam ni alvenis al la akceptejo, ni ricevis bonkoregan bonvenon de esperantistoj el diversaj landoj. Mi estis hejme, en fremda lando, ĉar mi estis en Esperantujo. Oni donis al ni mapojn, nomŝildojn, sakojn, kaj braceletojn. La braceletoj montris, kiajn manĝojn ni petis – ĉu viandajn, vegetaranajn, aŭ veganajn. Oni ankaŭ jam donis al ni nian unuan manĝon. Ni prenis ĉi tiujn kaj iris al niaj ĉambroj.

Je la unua tuta tago tie, mi pasigis la tutan tagon en la komitatkunsido, ĝis horzonozo kaptis min kaj mi

devis pardonpeti kaj reiri al mia ĉambro por dormeti. Multaj gravaj aferoj okazis dum la komitatkunsidoj tie kaj dum la venontaj du tagoj, kaj mi eĉ povis paroli iomete pri nia propra Kejti NEILSON, la nova Ĝenerala Sekretario de TEJO, al la komitatanoj, kiuj ankoraŭ ne konis ŝin, kaj same pri Alex MILLER, la kasisto de USEJ. Mi povis dum kelkaj tagoj partopreni voĉdonadon kaj diskuton pri gravegaj aferoj en la tutmonda junulara movado en Esperantujo.

Preskaŭ ĉiun nokton, iu bonega muzikisto koncertis por ni. Ĉiutage, ni partoprenis bonegajn, interesajn sesiojn. Ne nur okazis prelegoj, sed ankaŭ lingvo-lectionoj, danc-lectionoj, diskutrondoj, artaĵoj, ktp. Dum mia naskiĝtago, mi iris kun iuj kongresanoj al apuda kastelo kaj tagmanĝis ekstere apud ĝi. Kaj dum la tuta semajno, mi manĝis kaj kunsidis kaj festis kaj dancis kaj lernis kun bonegaj novaj amikoj, en Esperantujo.

Vi povas vidi iom da mia sperto ĉe **nia jutuba kanalo** <<https://www.youtube.com/user/EsperantoUSA/videos>>, kie oni povas trovi iujn

“vlogojn” (video-blogojn), koncertojn, kaj sesiojn de mia unua IJK, kaj intervjuojn kun multe da homoj tie – eĉ kelkaj denaskuloj kaj famuloj!

— Charlotte BURTON, Direktoro

Treasurer's Update

Esperanto-USA is a 501.c.3 non-profit corporation. Under this designation, the IRS regulations give us certain benefits and requirements. The main benefits are our tax status and participation in programs for non-profits.



The regulations also include how we spend our money and that financial reports must be made in English.

The membership approved our **2020 budget** at the *Landa Kongreso 2019* in Boston and after many years of having a deficit, we anticipate a positive net

balance. This improvement is primarily due to relocating our office. The budget starts in January 2020 and is our best estimate of our revenue and expenses, but there are no guarantees. Having been the Treasurer for a year, I can say that the Board takes the financial operation of E-USA seriously. (Please note that the Board members receive no financial support including LK registration, transportation and meet monthly via Zoom and work on individual projects between Board meetings.) All expenses are for the maintenance of E-USA and support of Esperanto efforts.

Membership dues are an important part of funding what we do. We hope that your membership is of value to you and we want you to know that it is a significant contribution to the Esperanto effort in the USA.

In the past few months we started a fundraising effort

called *Esperanto in USA* with the funds going entirely to USA Esperanto programs — especially for youth. This was to take advantage of a 100% generous match offered by the **Esperantic Studies Foundation** of donations up to \$15,000, to give us a total of \$30,000. This mission was entirely run by Board members and has had limited success – we are still quite short of the \$15,000. (You’d be surprised how much time and effort it takes to ask for money.) If you haven’t already contributed and would like to, go to **the ESF site** <<https://tinyurl.com/y5sjfmlj>>.

Be assured that the Board takes your membership seriously and is constantly considering how to make E-USA better serve you. If you have questions, concerns, or suggestions please feel free to contact me or any other Board member.

— Murray MERNER, Treasurer mmmm0320@gmail.com

Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>>. Ni petas, ke oni tamen atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer’s name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.

Esperanto en la banĉambro

leterkesto • Mark HAMME

Salutojn el la mezo de la Sonora Dezerto, t.e., usona malliberejo en Tucsono, Arizono! Preskaŭ ĉiu malliberulo ĉi tie scias, ke mi estas esperantisto. Mia nuna institucia laboro estas



bibliotekisto, kaj multaj viroj komentas pri la triparta artikolo pri Esperanto en la dudek-tria eldono de **Uncle John's Heavy Duty Bathroom Reader**

<<https://bit.ly/30DY8R5>>. Okaze de tio, ke vi eble ne konas la “Banĉambrajn Librojn”, tiuj estas libroj plenaj de bagatelaj faktoj pri preskaŭ ĉiu fako de homa scio.

Interese, la artikoloj nomiĝas *La Historio de Esperanto, Part 1* (skribita tiel, en paĝo 195), *Esperanto Parto Du* (paĝo 296), kaj kvankam ili havas kelkajn erarojn (ekzemple *dopatrino* anstataŭ *bopatrino*) ili parolas bone pri la internacia lingvo kaj eĉ rekomendas, ke novaj lernantoj skribu poemon kaj leterojn Esperante por lerni la lingvon pli rapide.

Parto Du parolas precipe pri la obstakloj, kiuj malhelpis la akcepton kaj kreskon de Esperanto,

inkluzive de la lingvistoj, kiuj kritikis Zamenhof-on ĉar li ne estis lingvisto, kaj tiuj, kiuj kredis, ke lingvoj ne devas esti facilaj. Aliuloj malakceptas la internan ideon aŭ la homfratecon de Esperanto.

Tamen *Parto Tri* defendas Esperanton kiel “la plej sukcesan konstruitan lingvon” kies kulturo ankoraŭ vivas per miloj da parolantoj. Bone, mi ne diris ĉion, kion diras la artikoloj. Mi rekomendas, ke **vi legu ilin** <<https://bit.ly/30DY8R5>>.

Alia afero: mi ankoraŭ ricevas *Usona Esperantisto* ĉe la malliberejo, sed korespondantoj devas sendi leterojn al mia patro, kiu gardos la kovertojn kaj poŝtmarkojn, kiujn oni sendas (ĉar mi estas filatelisto) ĝis mi transloĝiĝos al alia institucio, kie mi ja rajtas havi tiujn. Nuntempe ĉi tiu malliberejo forprenas ĉion, kiu enhavas gluaĵon. Ni ricevas nur kopiojn de poŝtkartoj! Ĉio tio ĉar iuj kaŝas sintezajn drogojn en tiuj. Sed mia patro sendas la leterojn rapide al mi. Skribu al:

Mark Hamme
c/o Franklin Hamme
1831 Happy Hollow Rd.
Petersburg, WV 26847

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Kejti NEILSON

laŭdoj • Charlotte BURTON



En ĉi tiu artikolo, ni festas aktivan junulon el Usono! Kejti NEILSON eklernis Esperanton antaŭ nur tri jaroj, sed ŝia nomo nun estas konata de aktivaj junuloj ĉirkaŭ la mondo.

Antaŭ tri jaroj, ŝi iris al la Internacia Festivalo de Raleigh, kie iu parolis al ŝi pri Esperanto kaj pri Pasporta Servo. Ŝi tuj interesiĝis pri la ebleco vojaĝi, kaj tiun nokton eklernis la lingvon per Duolingo. Iom poste, ŝi malkovris, ke ŝi havis kunlaboranton, kies edzo estas bone konata esperantisto. Kia bona fortuna! Ŝi do aliĝis al la loka klubo, kaj pro lia helpo, akiris someran postenon ĉe ESF. ESF helpis ŝin partopreni sian unuan NASK-on, kaj ekde tiam, ŝi partoprenis ĝin ĉiujare – en 2019, eĉ ŝia bebo partoprenis!

Dum Julio 2019, ŝi fariĝis Sekretario de USEJ – la USona Esperantista Junularo. Ŝi skribis la oficialajn regulojn de USEJ por la unua fojo en ĝia historio. Dum Aŭgusto, ŝi fariĝis Ĝenerala Sekretario de TEJO – la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Hodiaŭ, ŝi planas kaj novan podkaston kaj novan jutuban kanalon, ambaŭ por Esperantaj laboroj.

Tiom multe ŝi faris dum nur tri jaroj, kaj tiom multe ŝia vivo ŝanĝiĝas pro Esperanto (kaj ŝanĝas Esperantujon). Kion vi povos fari dum la venontaj tri jaroj?

Solvo de la enigmo en n-ro 2019:3

enigmo-solvoj

V	A	K	S		S	P	E	R	T	A		M	I	M
I	L	I	A		L	A	Ŭ		M		A	L	E	
B	I	B	L	I	O	G	R	A	F	I		L	I	M
R	E	L		A	G	I		K			A	Ĝ	A	
			E	M	A			S	A	K		E	D	Z
V	O	R	T		N	A	Z		G	A	J	N		
E	B	E	N	A		T		T	A	J		T	A	S
N	E	E		K	R	O	M	A	T	A		I	R	I
Ĝ	I	N		T	E	M		T		K	U	L	E	R
		K	R	O	M		S	U	K		N	E	G	I
B	O	A		R	I	T			L	A	G			
		K	R	I			E		D	I	G		O	S
M	A	N		H	I	D	R	O	E	L	E	K	T	R
U	Z	I		O			U	R	N		N	U	R	A
S	E	Ĝ		S	P	R	I	N	T		E	P	I	K

Gratulon al la ĉi-foja gajninto de la lotumado, **Ben TOVAR**. Li ricevos \$10-rabaton de la libroservo.

Dankojn kaj laŭrojn ankaŭ al niaj aliaj solvintoj: Roy MCCOY, Jerry G. JOHNSON, kaj Ellen EDDY.

Leonardo kaj kreemo

kongresaj raportoj • D. K. JORDAN

Jen resumo de la festparolado de d-ro David K. JORDAN, kiun li prezentis en Junio ĉe la Usona-Kanada Landa Kongreso en Bostono.



Nia du-nacia kongreso ĉi-jare centriĝas je la temo “kreemo kaj agado”. La vorto “krei” signifas fari, verki, aŭ ellabori – unuvorte *estigi* – ion novan. Kreemo estas la impulso kaj kapablo krei. Kreema persono ofte kreas, eĉ ne nepre konscie.

Mi ne certas kial mi konsentis priprelegi “kreemon”, temon tro abstraktan por facila kaj konciza traktado. Mi petis ideojn je kolegoj. Unu malhelpeme respondis, “Do, estu kreema!” Alia simple diris, “Parolu pri Zamenhof; li kreis *tutan lingvon*.”

Sed hodiaŭ ni solenas la pason de 500 jaroj (kaj 13 tagoj) post la morto de Leonardo DA VINCI, vaste taksata esti unu el la plej kreemaj personoj de homa historio. Do ni profitu mallongan repenson pri la vivo kaj atingoj de tiu multifacete talenta geniulo.

En 1452 (la 15-an de Aprilo) naskiĝis Leonardo en la vilaĝo Vinci [vinĉi] proksime al Florenco en Italujo. La 25-jaraĝa patro, Piero [pjero], estis notario, posteno prestiĝa, kaj pro tio rajtis uzi la titolon “Ser” antaŭ sia nomo; edzinon tamen li ankoraŭ ne havis. La patrino de Leonardo nomiĝis Caterina [katerina], kaj pri ŝi oni scias malmulte, krom tio ke ŝi ankoraŭ

ne edziniĝis. Leonardo do naskiĝis eksteredziĝe.

Se ekzistis amo inter Piero kaj Caterina, ĝi ne longe daŭris. Post ok monatoj Ser Piero edziniĝis Albiera-n, la filinon de ŝuisto, kaj post ankoraŭ kvar pluaj monatoj la patrino Caterina edziniĝis Accatabriga-n, vendiston de konstrumaterialojn.

Ni nenion scias pri la unuaj kvin jaroj de la vivo de Leonardo, sed en 1457, kvinjara, li ŝajne loĝis en la domo de sia avo Antonio [antonjo], kun sia amata Onklo Francesco [franĉesko], kiu estis tiam pli malpli 20-jara.

Verŝajne la familio havis sufiĉe da mono, kaj Francesco prizorgis bienojn, sed ne regule laboris. Anstataŭe li fariĝis la konstanta kunludanto kun eta Leonardo. Kune ili esploris la kamparon, kolektis “specimenojn”, kaj scivolemege dispecigis kaj plantojn kaj bestojn.

Oni rakontas, ke unu el la bienaj laborantoj de Ser Piero petis, ke eta Leonardo dekoraciui ŝildon por li. Leonardo ĵus lernis pri la fama helena serpent-harara monstro Meduzo, kies vizaĝo kapablis ŝtonigi homojn, do li decidis kovri la ŝildon per insektaj kaj bestaj partoj, tiel ke ankaŭ ĝi povos ŝtonigi homojn, aŭ almenaŭ timegigi ilin. Tiel impona estis la rezulto, ke patro Piero, iom ŝokite, gardis ĝin por si mem kaj ne redonis ĝin al la bienlaboranto.

Lernejoj kutime preparis promesoplenajn junulojn por karieroj en juraj aŭ ekleziaj rondoj. Sed, naskite eksteredziĝe, promesoplena Leonardeto rajtis nek ĉeesti tian lernejon, nek sekvi tian karieron. (Ĝis la morto li bedaŭris, ke li ne scipovis latinon.)

En 1466, kiam Leonardo havis 14 jarojn, Ser Piero translokiĝis en Florencon, kaj Leonardo fariĝis tie lernanto en la ateliero de Andrea del Verrocchio [verokjo], fama pentristo kaj skulptisto. Lian vivon en la ateliero, kie li loĝis kaj laboris kun aliaj junuloj, plejparte pli aĝaj, ni povas nur imagi, sed sub la probable severa reĝimo de Verrocchio li rapide fariĝis memevidente ilia plej brila desegnisto kaj pentristo. Verrocchio insistis pri plena scio de la homa anatomio kiel kondiĉo de efika pentrado, kaj tio estis tre akorda

kun la interesoj de Leonardo. Leonardo estis multtalenta. Li ne nur pentris. Li belege ludis liron kaj kantis “anĝele”. Same kiel kiam li infanaĝe ludis kun onklo Francesco, li ĉe Verrocchio observis ĉion kaj estis ĉiel scivolema kaj pri ĉio havis interesajn ideojn. Oni raportas, ke li estis ĉarma, kaj ankaŭ eĉ aparte bela.

Inter 1481 kaj 1490 Leonardo forlasis Florencon kaj loĝis en la kortumo de la grafo de Milano. Kiam li proponis sin al la grafo de Milano, memfide li skribis, ke li povas kanti kaj ludi, povas krei teatraĵojn kun interesaj efektoj, povas inventi militmaŝinojn por detrui nedetruiblajn kastelojn kaj povas plani kastelojn kiujn ne povas detrui militmaŝinoj, kaj aliajn fanfaraĵojn. Fine de la letero li aldonis, ke li ankaŭ kapablas pentri. Verŝajne lia celo estis fariĝi ne nur alte taksata pentristo, sed ĉiel-valora kortegano.

Nia geniulo ĉiam portis libretojn por noti novajn ideojn aŭ desegni ĉirkaŭaĵojn aŭ inventaĵojn. Per ili ni scias, ke li mense prilaboris flugilojn, helikopteron, akvo-levilon, tankon, helicon, maŝinpafilon, ŝnur-eskalon por sieĝi altajn murojn, savo-ringon por ŝipoj, kalkulilon mekanikan, arbaleston, kaj multajn aliajn. Sed nur rare li vere produktis tiajn inventaĵojn; li nur elpensis kaj desegnis ilin, kaj poste perdis intereson. Krome, preskaŭ ĉiuj efektive estis fuŝaj. Ekzemple en 1504 Florenco batalis kontraŭ Pizo, kaj laŭ plano pripensita de Leonardo, oni ŝanĝis la riverfluson por malavantaĝi al Pizo. Sed kiam venis ŝtormo ne antaŭpensita de li, mortis 80 homoj.

Li estis, oni kritike diras, prokrastema, maldisciplinema, kaj malpacienca por indulgi novajn interesojn. Li pentris malrapidege – entute nur 15 ĝis 20 finitajn pentraĵojn, kvankam majstroverkojn – en la tuta kariero, kelkajn damaĝitajn per eksperimentaj ĥemiaj fabrikmaterialoj eventuale nesukcesaj.

Revenante al la temoj de nia konferenco (kreemo kaj

agado), kaj agnoskante la geniecon ĝeneralan de Leonardo, sed lian brilan sukceson preskaŭ nur en la mondo de pentrado, oni rajtas demandi, “Ĉu sufiĉas genio sen ago?” “Ĉu desegnaĵo estas vera inventaĵo?” “Ĉu eĉ necesas genio por kreemo?” “Ĉu kreemo povas havi aliajn fontojn?”

Antaŭ multaj jaroj, kiam mi planis programerojn por la fama somera kursaro NASK, mi decidis, ke la altnivela kurso titoliĝu *Krea verkado en Esperanto*. Kolego rimarkigis al mi, ke en aliaj lingvoj nur post multegaj jaroj lernanto kuraĝas sekvi kurson por “kree verki”. Tamen en Esperanto tio ŝajnas tute natura. En aliaj lingvoj oni ne nur demandas (kiel ankaŭ en Esperanto), ĉu aŭ ne certa esprimo estas “laŭregula” sed ankaŭ ĉu denaskuloj jes sin esprimas tiel. En Esperanto tiu ĉi lasta demando estas nenecesa. La lingvo mem konstante invitas al ni krei novaĵojn. Efektive, oni malfacile eĉ balbutas Esperante sen kreemo.

Mi ne kuraĝus diri ke Esperanto *leonard-ig-as* nin (nova vorto ĵus kreita, sed kiun vi tuj komprenis). Sed verŝajne Esperanto ja emas kultivi niajn Leonardo-similajn kvalitojn de scivolemo kaj kreemo. Do Esperanto emas fari nin *leonard-id-oj*, t.e., Esperanto *leonard-id-ig-em-et-as* nin (alia nova vorto ĵus kreita sed kiun vi tuj – nu, almenaŭ eventuale – komprenis.)

Okaze de ĉi tiu 500-a leonarda datreveno, ni do *leonard-id-iĝ-u* per Esperanto!



D. K. JORDAN

D-ro Jordan estas emerita profesoro de antropologio ĉe UCSD, multfoja instruisto ĉe NASK, kaj aŭtoro de pluraj libroj, interalie *Being Colloquial in Esperanto* kaj *Rakontoj prapatraj pri nia lando antaŭ multaj jarcentoj kiam okazemis mirindaj aferoj*.

Instrui kaj praktiki Esperanton per surtablaj rolludoj

ludoj • Timoteo RICE

Sekvas teksto de prezento, kiun Timoteo faris ĉe la ĉi-jara Landa Kongreso en Bostono.

Homoj nature estas rakontistoj. Ekde la komenco de racio, la homaro verkis historiojn pri ĉio. Plej ofte la verkisto estis nur unu dum la rakontado, almenaŭ ĝis la jardeko 1970. El surtabla batalludado aperis nova formo de rakontado. Anstataŭ unu rakontisto, la tuta grupo povis partopreni. La unua eldonita sistemo estis *Galerioj kaj Drakoj* (angle *Dungeons and Dragons*), akirebla ekde la jaro 1974.

La nova ludo establis modelon kie unu ludanto estas la ludestro, kiu preparolas la imagan mondon, kie okazas la intrigo de la ludo, aktoras neĉefajn personojn en tiu mondo, kaj parolas pri la reagoj de tiu mondo pro la agoj de la ĉefaj personoj. La aliaj ludantoj aktoras ĉefajn personojn en la ludmondo. Kiam okazas ago, kiu povas malsukcesi, oni ĵetas kubetojn laŭ la reguloj. La rezulto de la ĵeto indikas ĉu la ago sukcesas.

Nu, kial estis rimarkinda tiu okazo? Estis rimarkinda ĉar nova maniero verki rakontojn ĵus kreiĝis. Komenciĝis granda furoro en la angloparolanta mondo kune kun morala paniko pri la fantazieco de la ludo. Multaj aliaj sistemoj eldoniĝis baldaŭ: fantaziaj, sciencfikciaj, modernecaj, ktp. Kelkaj eĉ celis povi ebligi ian ajn rakonton.

Sed dum jardekoj, neniuj sistemoj aperis en Esperanto.

Finfine, proksimume je la mezo de la jardeko 2000, Christopher GLEDHILL, kiu ankaŭ tradukis *La Hobito* de J. R. R. TOLKIEN, **tradukis**

<<http://bialylew.blogspot.com/2017/10/risus-en-esperanto.html>> la sistemon **Risus**

<<https://sites.google.com/site/risusarchivefiles/home/risus-esperanto.zip>> al la internacia lingvo.

Risus estas universala sistemo kreita por povi ludi rapide. La tuta regularo postulas nur naŭ paĝojn.

Pli da progreso okazigis Matthias VON LAER pere de la traduko de la bazaj reguloj de **la sistemo**

Vojtrovanto <<http://drakoj.ikso.net/>> (angle *Pathfinder*) al Esperanto. La projekto ankoraŭ

bezonas pli da tradukado.

Mi esperantistiĝis ekde la jaro 2007 kaj komencis ludi surtablajn rolludojn en la angla ekde la jaro 2010, ludante la 3.5-an eldonon de *Drakoj kaj Galerioj* ĝis la eldono de la 5-a eldono, kiun mi ludas nun.

La projekto traduki alian ludsistemon al Esperanto ŝajnis al mi farinda sed timinda. Antaŭ ol la Landa Kongreso de 2018 en Seatlo, mi decidis finfine traduki sistemon. Mi elektis traduki sistemon ĉar provi sistemon kreadan postulas multe da laboro kaj tempo. Mi serĉis sistemon, kiu estus kaj

- libera (ŝanĝebla kaj disdonebla de ĉiuj)
- universala (ne ligita al unu ĝenro de rakontoj) kaj
- plena (kun ĉio, kion oni bezonas por ludi)

Mi trovis la tiam-novan sistemon *Open Legend* ĉar

- laŭ ĝia permesilo iu ajn povas uzi la bazan regularon,
- oni povas rakonti ian ajn rakonton per ĝi, kaj
- la sistemo jam enhavas ĉion necesan por ludi.

Mi tre dankas al Matthias von Laer pro lia laboro krei terminaron pri surtablaj rolludoj en Esperanto. Pro tio la tradukado de *Open Legend* al **Malferma Legendo** <<https://rakontistoj.wordpress.com/>> estis rapide kaj relative facile. Ŝajne ĉiu sistemo en la angla penas priskribi la samajn ideojn per malsamaj vortoj. Mi ne intencas fari same en lingvo kiu strebas esti logika.

La unuaj provadoj okazis je la LK 2018 en Seatlo. Ĉiuj la partoprenantoj amuziĝis ege. La sperto de tiuj helpis pliutiligi la tradukon. Je la LK en 2019, pli da homoj povis ludi.

Bone, sufiĉe da tio. Kiel povas utili ĉi tio al vi?

Ĉu vi jam ludis surtablajn rolludojn en alia lingvo? Uzu unu el la ekzistantaj sistemoj por mojosa aventuro.

Se vi ne ankoraŭ ludis ĉi tian ludformon, legu la regulojn de *Risus*, ili estas simplaj kaj la eksplikado

estas tre ĝusta. Post tio, se vi volas ludi pli organizatan ludon, uzu *Vojtrovanto* aŭ *Malferma Legendo*.

Dum ludo, ĉiuj devas paroli. La ludoformo estas preskaŭ tute libera, do okazos diversaj konversacioj. Ekzemploj de tio el ludoj, en kiuj mi ludis estas

- kiam persono, kiu preskaŭ malliberiĝis pro nomi policiston “kamarado” dum la rusuja enlanda milito.
- kiam grupo, kiu decidis skrapi la fundon de haveno post aŭdi ke iu perdis juvelojn tie.
- kiam la grupo renkontis grupon de lacertuloj kaj trompe devigis helpon de ili per alivesti kiel drako. Fakte, tiuj, kiuj estis en tiu ludo nun uzas la frazon “ŝtofa drako” por evidentaj, sed efikaj ruzoj.

Tio estas helpa por praktiki Esperanton, sed kiel povas helpi lerni la lingvon? La tri sistemoj, kiujn mi menciis, jam ekzistas en multaj lingvoj, do komencantoj povas lerni la regulojn en jam konata lingvo antaŭ ol komenci ludi en Esperanto.

Dum jaroj da ludado, mi rimarkis ke ĉiu ludanto ŝatas uzi unikan helpilaron. Iuj ŝatas havi nur la regularon, unu de ĉiu bezonata kubeto, kaj sian personfolion¹. Aliaj ŝatas havi sakon da kubetoj, kajeron, kalkulilon, ktp. Mi jam kreis multajn helpilojn por *Malferma Legendo*. Mi konsilas havi ilin akireblaj sed ne devigi al ludantoj ilin uzi.

Ĉi tio estas ĉi tiam nur ideo; nek mi nek alia (laŭ mia scio) antaŭe klopodis instrui Esperanton per surtabla *rolludo*. Oni povas peni fari tion nun, sed pli da

laboro helpos.

La baza regularo kaj helpilaro de *Malferma Legendo* ankoraŭ enhavas erarojn. Se vi trovas eraron, bonvolu uzi la kontaktilon je la retejo.

La tradukado de *Vojtrovanto* ankoraŭ ne estas tuta. Se vi ŝatas tiun sistemon aŭ la 3.5-an eldonon de *Galerioj kaj Drakoj* (ambaŭ sistemoj estas interŝanĝeblaj), vi povas helpi traduki la sorĉojn, bestaron, ktp.

Ĉiuj sistemoj ankaŭ bezonas la helpon de ĉiaj artistoj. Verkistoj: praktiku skribi rakontojn per verki aventurojn. Pentristoj kaj desegnistoj: helpu al ludantoj imagi mondojn klare. Projektoj ankaŭ bezonos vian atenton, kaj fojfoje monon por prosperi.

Kaj kial resti kun nur tri sistemoj? Ju pli da ideoj, des pli da kreado. Ekzistas multaj sistemoj malfermaj en multaj lingvoj, aŭ kuraĝuloj povas krei novan sistemon en Esperanto. Kio gravas plej estas la memorindaj tempoj inter amikoj ofte novaj, kaj la rakontoj, kiujn ili verkos kune.

1. **personfolio** = folio kun la gravaj detaloj pri ludata persono.



Timoteo RICE

Timoteo estas la Rajtprotektanto (angle, *Ombudsman*) de E-USA kaj pasintjare li estris la Kandidatigan Komitaton. Li loĝas en Oklahomo.

ombudsman@esperanto-usa.org

La murdita skiisto

enigmoj • Daĉjo RUTAN

Elija ŜIBOLET eniris la oficejon kaj fermis la pordon. Lia bona amiko, detektivo Senom, ekstaris kaj premis lian manon.



“Estas bone vidi vin, Elija. Mi havas kuriozan aferon por vi.”

Profesoro Ŝibolet sidiĝis kaj prenis cigaron el la cigarujo sur la skribotablo. Dum li bruligis ĝin li diris mokete, “Ĉu vi refoje perdis vian kajeron?”

“Certe ne. Jen!” diris Senom, kaj li prenis ĝin el sia pluvmantelo.

“Bone. Nu, bonvolu diri la aferon.”

Senomo stariĝis kaj anoncis, “Unue, ni devas iri al la loko!”

La detektivo veturigis sian amikon per aŭto al luksa loĝejaro ĉe fora flanko de la urbo.

“Kiam la mez-januarra varmiĝo fandis la neĝdunojn en la montaro Barŝirma”, rakontis Senom, “en ski-feriejo tie la polico trovis sportaŭton en flankvojo apud izolita ĉaledo. En la ĉaledo ili trovis la kadavrojn de Aŭrora SENVIV kaj Antonio ALTEJ. Ili estis mortpafitaj per fusilo”, li daŭrigis. “Ambaŭ estis registritaj ĉe la ferieja oficejo sub falsaj nomoj.”

“Eble temas pri amafero”, sugestis profesoro Ŝibolet.

“Ni trovis nenion por subteni tiun konjekton”, diris Detektivo Senom. La du krim-solvistoj nun estis en la trofeoplena salono de Antonio Altej. Profesoro Ŝibolet legis tabuleton el acerligno, kiu nomis Antonion la dua fininto en la pasintjara Akvoskiada Konkurso.

“Do kial vi veturigis min ĉi tien kaj ne al la ĉaledo? La

krimo ne okazis ĉi tie.”

Senom pergeste montris tablon ĉe la kontraŭa flanko de la ĉambro. “Jen, rigardu!”

Sur la tablo sidis kvar naskiĝtagaj donacoj; policanoj jam malfermis ĉiujn. Ŝibolet ekzamenis libron pri subakva trezorserĉado donacita de Paŭlo LIVAMAN, paron da ski-bastonoj de Georgo NIKOV, harpun-pafilon de Johano PRUNDON, kaj sunkaskon de Rinjo SUPREBRIL.

“Pro sia reputacio, Altej ricevis laboron dum jaroj”, diris Senom. “Li instruis akvoskiadon kaj senskafandran subakviĝon al famuloj. Eble se li restus en tiu okupo, li ankoraŭ vivus.”

“Sed li estis tre sekretema. Li neniam diris al iu ajn, kion li planis, certe ne pri la rendevuo kun Aŭrora Senviv. Li invitis kvar homojn al sia naskiĝtaga festo ĉi tie. Ili venis, sed Altej ne ĉeestis. Je tiu nokto li registris sin en la feriejo sub falsa nomo.

“Ĉu vi suspektas iun?”

La detektivo konsultis la kajeron. “Mi parolis kun la kvar homoj. Antonio skribis al la kvar la saman inviton:

Antaŭ ol mi foriros por skii, venu kaj festu mian naskiĝtagon. Mardon. Ĉe mi. Je la oka, vespere.

La gastoj, Livaman, Nikov, Prundon, kaj Suprebril, lasis la donacojn kun la loĝejara kontrolisto kaj reiris al siaj hejmoj. Ili ĉiuj diris, ke ili ne scias, kien Altej iris por skii.”

“Unu el ili evidente mensogas,” diris Ŝibolet. “Mi havas bonan ideon, kiu estas la kulpulo.”

Kiel Ŝibolet scias, kiu kulpas? Se vi havas supozon, sendu nur unu solvon al redakcio (adresojn trovi en la kolofono) **antaŭ la 15-a de Oktobro**. Inter la solvintoj ni lotumos \$5-rabaton de la retbutiko.
